


65-a jaro n-ro 189 2024:5

la lampiro



# André Marinho

Enŝorĉiginta de  
esperantaj  
idealoj





O **Programa Mia Amiko** tem na EASP sua base institucional, trabalhando juntos pelo progresso do Esperanto. Ao adquirir um livro na EASP, você estará contribuindo para o **Fundo Educação PMA-EASP**, pois uma parte do valor de cada venda será destinada diretamente a esse fundo. Fiquem ligados!



# Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**  
Por ne lasi truon
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**  
Elkoran dankon!
- 6 | **Kino kaj aliaj artoj**  
La knabo kaj la ardeo
- 8 | **Intervjuo**  
André Marinho
- 12 | **Iom da Filozofio**  
Sur ŝipo kun Platono
- 14 | **El mia vidpunkto**  
Liberaj pensoj: Metodo por  
kreopova verkado
- 17 | **Edukado**  
Progreso kaj defioj en uzado de  
poŝtelefonoj en brazilaj lernejoj
- 20 | **Iom da gramatiko**  
Lingvaj Respondoj
- 22 | **Taglibre**  
Oni privatigu ĉion!
- 24 | **Recenzo 2**  
Hispana somero
- 26 | **Movado**  
E-kongreso en Paulínia: Plena  
sukceso!
- 28 | **Enlande**  
Esperanta Ambassadejo de  
Poŭzalegro: inkluzivo k kulturo
- 30 | **Iom da poezio**  
Augusto F. Schmidt: Malpleno
- 31 | **Memorfeste**  
La Kristo Redemptora en verda  
koloro je la 15-a de decembro

la lampiro

65-a jaro n-ro 189 2024:5

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sergio Viana  
(psviana@terra.com.br)

**Enpaĝigo:** José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas  
pri la subskribitaj artikoloj*



## Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

### Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
easp.org.br | contato@easp.org.br

### Estraro

**Prezidanto:** Esmeraldo A. Alencar de Lima

**Vicprezidantino:** Cristina de Claudia Graaf

**Sekretariino:** Maria Conceição Rodrigues

**Kasisto:** José R. Tenorio da Silvas

### Konsilantaro

Paulo Sergio Viana  
José Mauro Progiante

### Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

## Jarkotizo por 2025

Simple Membro .....	R\$ 200,00
Subtena Membro .....	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro .....	R\$ 100,00

## Por ne lasi truon

Ĉi tiu numero de nia revuo estas la unua post la kongreso de EASP, kiu sukcese okazis en la urbo Paulínia, en septembro. Bedaŭrinde mi ne sukcesis kuraĝulon, kiu povus pretigi detalan priskribon kaj analizon pri tiu grava evento. La kongreso estis vere sukcesa, kun siaj pli ol 70 partoprenantoj. La granda heroo rilate tion estas nia membro James Piton, kiu preskaŭ sola sukcesis pretigi bonegan organizon kaj riĉan programon. La publiko unuanime aplaŭdis lin. Tamen, mi

mem, kiel redaktanto, prezentas en ĉi tiu numero de La Lampiro simplan raporton, kiu celas almenaŭ ne lasi truon en nia historio pri tiu sinsekvo de kongresoj de nia kara ŝtata asocio.

Laŭ propono de Piton, ni devus kunsidi kaj diskuti pri tiu ĵusa sperto, kiu povas helpi, ke estontaj kongresoj okazu pli facile, pli oportune kaj malpli lacige.

Bonan legadon!

SABATO  
**14** DEC  
15-a horo

Zamenhofa  
Tago

En la sidejo de EASP  
R. Faustolo, 124 - Água Branca

easp  
Esperanto-Asocio de São Paulo

## Elkoran dankon!

Saluton, geamikoj kaj gelegantoj!

Kun granda plezuro mi diras al vi, ke nia kongreso estis sukcesa kaj tre bela. Mi dankas elkore al ĉiuj, kiuj partoprenis kaj favoris la eventon.

Ĉiuj prelegantoj sindediĉe al nia movado transdonis siajn konojn en nia lingvo. Iliaj prelegoj estis ege valoraj.

Mi dankas al Fernando Maia, Vic-Prezidanto de UEA, kiu per sia ĉeesto multe kontribuis al EASP kaj BEL.

Mi dankas ankaŭ al Adonis Saliba, pro lia partneriĝo per la kunlaboro

inter EASP kaj Programo Mia Amiko. Unuvorte, mi dankas al ĉiuj, kiuj kunlaboris por tiu sukceso.

Laste, al James Resende Piton, nia gastiganto, kiu lastmomente devis trovi alian sidejon por politikaj cirkons-tancoj rilataj al la brazilaj balotadoj. La nova sidejo montriĝis komforta kaj tute adekvata.

Mi esperas, ke nia kongreso spro-nos la movadon al pli vigla kaj energia agado por nia lingvo en nia ŝtato.



## Kinkas Borba

Machado de Assis

Tradukis Francisco S. Wechsler

Lanĉota okaze de la  
Zamenhofa Tago

# La knabo kaj la ardeo

Anna Lobo de Carvalho

Direktoro: Hayao Miyazaki

Lando: Japanio, 2023

Tiuj legantoj kiuj akompanas min jam scias ke mi amegas la filmojn de Ghibli. Kiam mi rimarkis ke la nova filmo de Miyazaki eniris en la liston de Netflix, mi tuj decidis recenzi pri ĝi. La filmo estas “La knabo kaj la Ardeo”, kaj ĝi estas la unua filmo de la japana filmo-produktejo kiu gajnis “Oscar” premion.

La filmo temas pri Mahito. Li estas ĉarma knabo kiu ĵus malkovris ke lia patrino forpasis meze de fajro kiu okazis en malsanulejo. Post tio, li kaj lia patro decidis translokiĝi al alia loko, kaj tiam oni malkovras ke la onklino de Mahito iĝos lia patrino.

Mahito devas alfronti multajn defiojn en la nova domo, ĉar li ne akceptas la forpason de sia patrino kaj iĝas sufiĉe ribelema kaj disputema. Tie li ankaŭ konas la ardeon de la domo, kiu fine allogas lin al fantazia aventuro en kiu li prilaboras per tre kortuŝa mani-



ero, kion li sentas rilate al kio okazis al la patrino.

Estas tre interese punkto ke tiu ĉi filmo estas unu el la malmultaj filmoj de Ghibli kiu estas pli pri “knabo”, ĉar kutime estas inaj roloj. Kaj tial la ĉefaj koloroj estas oranĝa, blua kaj verda, plenaj je aferoj de knaboj. Aldone, la animacio mem estas tre tre bone farita, kun tre naturaj movoj kaj la kutima bela kaj ĉarma etoso.

Mi instigas vin spekti tiun belegan filmon, kaj malkovri pli pri kio okazas en la aventuroj kiujn Mahito travivas en tiu fantazia mondo al kiu la ardeo insiste alvokas. Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

# Perdita en tradukado

Leandro Abrahão

**Lost in translation** (*Perdita en tradukado*)

**Aŭtoras** Ella Frances Sanders


**Tradukis** Livia Deorsola

**Eldonejo** Livros da Raposa Vermelha, 2018

ISBN 978-85-66594-35-5

Malve, la bondeziraj tagoj! Tagoj, kiam mi antaŭĝuas la gajnon de uŭ libro! En la pasinta Kristnasko, miaj gebofratoj donacis al mi ege plaĉan kaj spritan verketon, nome *Lost in translation* – ilustrita kolekto de netradukeblaj vortoj el ĉiuj mondopartoj. Nu, tradukita libro el netradukeblaĵoj. Temas pri vortoj, kies origina signifo estus apenaŭ aŭ neniel esprimeblaj per samsignifa vorto aŭ esprimo en alia lingvo.

La aŭtorino kolektis 49 vortojn el 31 lingvoj. Neniu el la portugala tamen. El la japana, ekzemple: KOMOREBI (substantivo); priskribe: la lumo, kiu radias tra folioj de arbo. El la sveda: RESFEBER (substantivo); priskribe: la malkvieta pulsado de koro de vojaĝonto antaŭ la ekiro.



Esperanto estas iasence priskriba lingvo. La libreto konsistigus tre bonan ekzercilon por progresantoj.

Fine, el la hungara: SZIMPATIKUS (adjektivo); priskribe: ĵuskonato, pri kies bonkoreco la ekkonanto intuicias. Laŭ la sesa eldono de la vortareto hungara-esperanta, de Alfonso Pechan, SZIMPATIKUS signifas simpatia Kial do la vorto troveblas en kolekto de netradukeblaj vortoj? Laŭ Piron, “la vorto estas standardo, kiu konigas la teritorion”, kiu “povas esti multe pli vasta (...)” (La Bona Lingvo, ĉapitro 5).

Jen recenzeto de nelingvisto, do de ordinara legema kaj librama esperantisto.

## André Marinho

*Pasintmonate universitata junulo el la urbo Salto-SP skribis al la asocio petante revizion por la esperanta versio de sia jura finlaboraĵo pri Esperanto. Per trafikaj argumentoj, koheraj kun almenaŭ du prestiĝaj dokumentoj, nome Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj Federacia Konstitucio de Brazilo, li montras kiel artefarita lingvo kia Esperanto estas oportuna ilo disponebla al pledantoj por egaleco kaj socia justeco.*

*Tiu kontakto estis vere agrabla surprizo, des pli ke li akceptis la inviton intervjuigi, tiel ke ankaŭ vi iom konatiĝu kun li.*

### **Kiu estas André Marinho?**

Mi estas 36-jara, mi estas ĵurnalisto kaj mi nun kompletigas la antaŭlastan jaron de jurstudo.

### **Kiam kaj kiel vi konatiĝis kun Esperanto?**

Mi jam delonge aŭdis pri Esperanto, sed neniam mi profunde enrigardis la temon. Dum la pandemio, studante la hispanan, subite venis en la menson Esperanto. Pro scivolemo mi decidis esplori la lingvon kaj, en la procezo, mi komprenis ĝian proponon kaj sorĉiĝis de esperantaj idealoj. Antaŭ tio, mi eĉ ne sciis, ke Esperanto estas planita kaj neŭtrala artefarita lingvo — mi imagis,

ke ĝi estas dialekto de kelkaj foraj homoj.

### **Kiel estiĝis la ideo esplori pri la temo "Esperanto kiel ilo por promocio de egaleco kaj socia justeco" kadre de via fakultata laboraĵo?**

Post mia esploro pri Esperanto, mi sentis la deziron lerni ĝin. Dum miaj sendependaj studoj, mi konstatis, kiom pli egalece kaj juste estus, se Esperanto estus uzata kiel lingvo de internacia komunikado inter homoj el diversaj nacioj, anstataŭ la angla, kiu ĉiam profitigas al denaskuloj, kiuj eĉ ne bezonas fari la klopodon lerni duan lingvon. Surbaze de tiu ĉi pripensado,



mi decidis, ke ĉi tio estos la temo de mia jura konkluda laboro, bazante miajn esplorojn sur la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Artikolo 1 establas ke "ĉiuj homoj naskiĝas liberaj kaj egalaj en digno kaj rajtoj", kaj artikolo 2 garantias ke ĉiu havas la rajton ĝui la liberecojn de la Deklaracio sen ia ajn distingo, inkluzive de lingvo. Tiel, kiam UN adoptas la anglan kiel la normon de komunikado inter nacioj, ĝi iel neas la valorojn esprimitajn en la Deklaracio.

### **Kiel viaj samkursanoj, kaj aparte via fakultata orientanto, akceptis vian decidon prilabori esperantan temon?**

Miaj kolegoj kaj konsilisto estis sufiĉe surprizitaj de la temo, ĉar ĝi estis io noviga, ekster la konvenciaj temoj de Juraj verkoj, kiuj ĝenerale ne traktas ĉi tiun interdisciplinecon inter lingvoj kaj juro. Multaj homoj eĉ ne sciis kio estas Esperanto. Nia unua konsilisto eĉ proponis, ke ni ŝanĝu la temon, ĉar, laŭ ŝi, ĝi ne estas sufiĉe grava en la jura kampo. Tamen, ĉar mi ĉiam kredis je la jura kaj socia valoro de Esperanto, mi petis permeson trovi novan konsiliston, kiu pli bone komprenos la proponon kaj kunhavigos ĉi tiun vizion. Permeso estis donita, kaj kun la nova konsilisto ni povis fini la artikolon kiel planite.

### **Lastatempe aŭtomataj tradukiloj rapide populariĝas kaj helpe de Artefarita Intelektio fariĝas pli kaj pli konvinkaj kaj precizaj. Laŭ vi, ĉu la atendita rolo de artefarita lingvo kia Esperanto riskas esti anstataŭita de tiaj tradukiloj?**

Kvankam maŝintradukiloj fariĝas ĉiam pli utilaj, precizaj kaj disvastigitaj, mi kredas, ke ili ne povas anstataŭi la homan faktoron en komunikado. Esperanto proponas ne nur avantaĝojn en tradukado, sed ankaŭ ideologian kaj humanisman bazon. Ĝi estas lingvo kreita por antaŭenigi pacon kaj kunlaboron, dum maŝintradukiloj estas nur iloj por adapti la materialon. Krome, Esperanto povus kompletigi teknologion, eble eĉ fariĝi parto de tutmondaj solvoj, precipe en kuntekstoj, kie buŝa komunikado inter diversaj nacioj ankoraŭ reprezentas baron.

### **Malkiel vi, kiu post konatiĝo kun E-o deziris lerni ĝin, multaj homoj konatiĝas kun la lingvo, simpatias al ĝiaj idealoj, sed ne emas lerni ĝin. Ĉu eblas antaŭenpuŝi la idealojn de Esperanto ne parolante ĝin?**

Jes, mi kredas, ke eblas antaŭenigi la idealojn de Esperanto sen nepre regi ĝin. Tiuj idealoj, kiel egaleco, lingva

justeco kaj respekto al kulturoj, estas universalaj kaj povas esti defenditaj per agoj kiuj antaŭenigas kulturen diversecon kaj inkludon. Tamen, lerni Esperanton estas maniero sperti tiujn principojn pli profunde, ĉar parolante la lingvon, vi aliĝas al tutmonda komunumo kiu kunhavas tiujn samajn valorojn. Krome, lernante kaj uzante Esperanton, vi plifortigas la gravecon de la lingvo kaj komencas diskuti viajn aferojn pli taŭge.

**Estas sciate ke Esperanto konsideras ĉiujn lingvojn, sed batalas kontraŭ tiu situacio en kiu iu nacia lingvo tenas sian regadon super aliaj lingvoj. En kelkaj rondoj tamen nemalofte aperas rektaj mencioj pri la angla kiel reganta lingvo. Ĉu tio ne povos pasigi la impreson ke inter Esperanto kaj la angla estiĝas ia batalo?**

Estas kompreneble, ke la angla ofte estas menciita ĉar ĝi estas la domina lingvo sur la tutmonda scenejo. Tamen Esperanto ne poziciigis "kontraŭ" la angla, sed proponas ekvilibron fronte al lingva malegaleco. La celo ne estas batali la anglan mem, sed serĉi pli justan komunikformon, kie homoj povas esprimi sin en egalaj kondiĉoj, sen esti submetitaj al la lingvo de domina nacio. La vera batalo estas

kontraŭ la malekvilibro, kiu favoras denaskajn parolantojn de hegemoniaj lingvoj, kiel la angla.

**Freŝdate el diversaj flankoj leviĝas voĉoj por reformoj en la jam 60-jara UN. Laŭ vi, kiam tiuj reformoj efektiviĝos, ĉu la organizaĵo estos sufiĉe matura por konsideri la alprenon de Esperanto almenaŭ kiel unu plia laborlingvo?**

Mi kredas, ke reformoj ĉe UN povas malfermi spacon por pli larĝaj diskutoj pri aferoj de tutmonda komunikado kaj inkluzivo. Kiam la organizo estas pli matura kaj koncentrita al lingva egaleco, la ideo de Esperanto povas akiri forton, almenaŭ kiel unu el la laborlingvoj, ĉar ĝi proponas praktikan kaj neŭtralan solvon por faciligi la dialogon inter nacioj.

**Okaze de via esploro pri Esperanto, kiun alian aspekton de la lingvo vi konsiderus inda je plia studado?**

Fascina aspekto, kiu meritas pli da studo, estas la kultura efiko de Esperanto tra la historio. Kiel planlingvo, kiu transpasas landlimojn, ĝiaj implicoj en la kampo de socilingvistiko kaj ĝia rolo en movadoj por tutmondaj paco kaj justeco estas ege trafaj kaj malmulte esploritaj.



## RAPIDAJ RESPONDOJ

- **Ŝatokupo**  
Legi, skribi kaj promeni ekstere.
- **Preferata libro**  
Biografio de Steve Jobs.
- **Ŝatata frazo**  
"Granduloj ne naskiĝas grandaj, ili fariĝas grandaj."
- **Nuna legado**  
Majstroj de Komando; de Barry Strauss.
- **Ŝatata(j) verkisto(j)**  
Walter Isaacson.
- **Muzikinstrumento**  
Piano.
- **Plej bongusta plado**  
Bifstekoj kun terpomoj.
- **Hejmbesto**  
Mi ne havas, sed mi ŝatus havi hundon
- **Loĝinda loko**  
Bieno en trankvila loko.
- **Kio plej ĝenas vin?**  
Malrespekto.
- **Plej granda timo**  
La malsukceso ne vivi plene.
- **Virto plej kara**  
Respekto.
- **Familio**  
Defio.
- **Homaro**  
Grandega potencialo, ankoraŭ realigota.
- **Vivo**  
Viktimo.
- **Paco**  
Interna silento meze de kaoso.
- **Interna ideo de Esperanto**  
Unueco en diverseco.
- **Kion vi plej aprezas en viaj geamikoj?**  
Aŭtentikecon.



## Imaga interparolo kun filozofoj

### Sur ŝipo kun Platono (4-a jarcento a.K.)

Post intervjuo kun Sokrato, vojaĝinte antaŭen kelkajn jarojn en la tempo, la amatora filozofo de la 21-a jarcento alvenis denove en Ateno kaj serĉis Platonon en lia Akademio. Tie li eksciis, tamen, ke la filozofo estis en unu el siaj multaj vojaĝoj. Fakte li trovis lin sur ŝipo, klinita super la ŝiprandon, ŝajne rigardanta la horizon-ton. Estis facile rekoni lin, eĉ vidante nur lian dorson.

— Bonan matenon, sinjoro. Pro viaj larĝaj ŝultroj, mi imagas, ke vi estas la granda filozofo Platono. Pardonu, se mi interrompas viajn pripensojn. Mi vivas en estonteco, pli ol dudek jarcentojn antaŭe, kaj venis por havi la honoron renkonti vin.

— Estas plezuro malkovri, ke en fora estonteco oni ankoraŭ scios pri mi, ke miaj papirusaj rulaĵoj estos konservitaj ĝis tiam. Bonvenon, fremdulo.

— Fakte ili ne estos papirusaj rulaĵoj, sed libroj, interreto... Tamen tio ne gravas. Gravas, ke viaj ideoj daŭros tra la jarcentoj. Kaj parolante pri ideoj, sciuj, ke estos multe studata via teorio pri mondo de ideoj, neŝangebla kaj eterna, de kiu la fizika mondo estas nur neperfekta ombro.

— Do oni interesiĝos pri tio, bonege! Ĵuse, kelkajn minutojn antaŭ via alveno, mi vidis kavernon sur tiu insulo, al kiu ni alproksimiĝas, kaj mi ekpensis pri maniero pli bone klarigi tiun teorion. Mi imagis, ke en ĝi estas aro da katenitaj kaptitoj...

— Nekredeble! Mi spektas la naskiĝon de la Alegorio de la Kaverno! Katenitaj kaptitoj vidas nur ombrojn projekciitajn sur la kavernmuron...

— Jes, ili vidas nur ombrojn kaj pensas, ke tio estas la realo. Bonega

ideo, mi profitos ĝin por daŭrigi la rakonton. Dankon, vojaĝanto.

— Ho, ne dankinde. “Mi urĝe ŝanĝu la temon, ne konvenas enmiksiĝi en la faktojn de la pasinteco”. Jes, s-ro Platono, daŭrigu, la fino estos bonega.

— Kaj ĉu la homoj akceptos miajn pensojn pri la perfekta socio? Mi certas, ke mia idealo pri tio plene realiĝos. Kiel bonŝanca vi estas, vivanta en mondo regata de filozofoj, en kiu justeco estas rigardata kaj praktikata kiel la fundamenta virto.

— Ĉu vi parolas pri mia mondo? Nu bone, ĉar mi ne havas multe da tempo por resti ĉi tie, mi volas danki, nome de la tuta homaro, ke vi konservis la ideojn de via majstro Sokrato. Sen vi ili perdiĝus.

— Tio estas mia devo, ĉar liaj instruoj estas esencaj por serĉado de la saĝo. Parolante pri tio, ĉu en via tempo ĉiuj homoj estas saĝaj, ĉiuj ili lernis la instruojn de Sokrato?

— Ĉu vi vere volas scii, ĉu ĉiuj homoj estas saĝaj en mia epoko? Sinjoro Platono, mi vere bedaŭras, sed mia tempo ĉi tie finiĝas. La ŝipo jam albordiĝas, mi devas adiaŭi vin.

— Mi komprenas. Tamen, bonvolu satigi lastan scivolaĵon mian: ĉu la

Akademio, kiun mi fondis, ankoraŭ ekzistas?

— Bedaŭrinde ne, sed ne malĝoju, ĝi daŭros naŭ jarcentojn. Ĝi estos tiel grava en la historio, ke la vorto “Akademio” iĝos sinonimo de studejo, loko, kie oni serĉas sciojn. Kurioze, en mia lando, Brazilo, ĝi signifos ankaŭ lokon por prizorgi la korpon pli ol la animon, eĉ por havi larĝajn ŝultrojn, kiel la viaj. Sed tio ne gravas. Adiaŭ!

— Vi rivelas strangajn aferojn, vojaĝanto, sed estis plezuro renkonti vin. Adiaŭ!

— Ho, mi ĵus memoris pri io grava. Mi ĉiam petas de filozofoj kelkajn konsilojn por transdoni al miaj legantoj. Kio venas al via menso?

— Jen tri el miaj pensoj, du seriozaj kaj alia ne tiom:

"La puno, kiun la bonuloj suferas, kiam ili rifuzas agi, estas vivi sub la regado de malbonuloj."

"Saĝulo ĉiam volas esti kun iu, kiu estas pli bona ol li."

"Ĉiu viro estas poeto, kiam li estas enamiĝinta."

**José Mauro Progiante**

# Liberaj pensoj: Metodo por kreopova verkado

Paulo Nascentes

Verŝajne komunikiĝi estas denaska kapablo. Tiu kapablo ekzistas en bebo antaŭ ol ĝi parolas aŭ skribas. Familie kaj komunume, okazas la lernado de la ĉirkaŭa patrina lingvo. Nur poste, ĝenerale lerneje, venas la eniro en la skriban mondon. Multaj tamen mislernas verki eble pro nacilingva misinstruado. El tio naskiĝas tia kredo: “ho! mi ne scipovas la portugalan!” Multfoje misas la pedagogio de tekstoj-legado kaj verkado, kio estas aparta kapablo de lingvoakirado. Pri la kaŭzoj de tiu fenomeno, ni ne okupiĝu, sed nur pri ĝia konstato kaj ebla solvo. Esence kio mankas aŭ perdiĝis?

Ĉu iel mankas persona kontakto mem kun la esenco? Jen hipotezo, eĉ se tiu esenco estas nemezurebla, do supoze neekzistanta? Pri tiu penso-modelo ankaŭ ni ne diskutos. Sed, interesas nin, ĉu estas rimedo kapabla ŝanĝi la malkomfortan situacion. Certe

oni rajtas kapabliĝi kaj verki sociutilajn tekstojn minimume esprimovajn. Ĉu oniaj plej kaŝitaj mensaj tavoloj ne meritas sunlume aperi? Alivorte, ĉu onia psiĥa tuteco ne meritas libere esprimiĝi?

Forte impresis min artikolo aperinta en Majo 1986 en la revuo “O Rosacruz”, bulteno de la brazila sekcio de AMORC, nome “O Ritmo Pessoal” (La persona ritmo) de Louise Anderson. Temis pri psikologia kolektiva eksperimento okazinta en usona universitato. Laŭ ĝi, grupo de selektitaj homoj skribis pri siaj pensoj, impresoj kaj konvinkoj dum almenaŭ 10 minutoj, senhalte, ĉiutage. Nenia paŭzo devus veni ĉu por elekti la ĝustan vorton, ĉu por ĝustigi gramatikaĵojn aŭ ortografiaĵojn, aŭ eĉ por alveni al logika sinsekvo da ideoj. Estas nur du reguloj aŭ rekomendoj: unue, daŭre ripetu la lastan vorton ĝis alia ekaperu viamense

kaj due, estu sincera, ĉar vi rajtas detrui tiun skriban esprimon. Mia decido sperti tion dum ĉirkaŭ tri semajnoj ŝajnis neevitebla antaŭ mia ekscitita scivolo. Mian propran sperton mi ne diru. Tamen, iom poste, partnere kun psikologo, ni ekgvidis klasojn pri tekstofarado en lernejoj, kongresoj laŭ la metodo de ni aranĝita surbaze de la artikolo. Kelkaj rezultoj rilate la tekstokvaliton impresis nin kaj diversajn partoprenantojn. Jarojn poste, etendiĝan porinstruistan kurson mi gvidis en Beletra Instituto de UnB. El ĝi venis lumen la nuna versio kune kun plia esploro. Tiel, partnere kun alia amikino, ni okazigis perrete kurson, nome “Esenca Verkado”. El kio ĝi konsistas?

Facile konstateblas, ke ofte multaj tekstoj ŝajnas esti verkitaj kvazaŭ nur cerbe. Pro hastaj, malprofundaj, senbazaj pedagogiaj konkludoj, ŝablonoj supozeble efikaj estas proponataj al lernantaro, cele al aprobiĝo en ekzamenoj. Claver (2006) pritraktas du problemojn: la uzon de “reguloj de bona verkado” kaj tion, ke “metodoj kaj teknikoj de verko-instruado ne sukcesas superi la akademismon kaj la rutinon”.

Imagu, kion faras muzikisto antaŭ ol koncerti? Same volejbalisto aŭ futbalisto kion ili faras antaŭ la matĉo? Kion celas la unuaj akordoj, neaŭd-



eblaj duonvoĉoj, liberaj pilkoŝotoj? Certe la celo estas agordiĝi al la uzota instrumento, ĉu voĉo, ĉu gitaro, ĉu la korpo mem. Tial kadre de nia metodo, unue estas proponata varmiĝo per spirado, korpaj movoj, liniigado al nia centro. Due, skribi vortojn, liberajn kiel proceso, tiel skribi senĉese ion ajn dum 10 minutoj. Trie, teksto kiel emociigilo, tio estas, legado kaj aŭskultado de poeziaĵo, kanto de la tiel nomata brazila popolmuziko. Kvare, teksto kiel produkto: venas propradire la tekstoverkado mem. Laste, sed ne balaste, tekstolibonigo per legadorondo cele al la tekstokomunikado kaj ĝia kunlabora plibonigo. Ĉiuj do bonetose kunlernas.

Du tiamajn kuriozaĵojn mi rakontu por montri la animstaton de malsamaj kursintoj. L i estis timema lernanto de publika lernejo, 13-jaraĝa, kaj viro ĉe la pordo, kiu geste volis komunikiĝi kun la koramikino ene de la klasĉambro. Post la komando skribi vortojn dum 10 minutoj, la knabo timeme, malfort-

voĉe, levis la manon kaj demandis min, ĉu li rajtis skribi... fivortojn. Ridete, mi jesis: “Trankviliĝu! Certe vi skribos neniun, kiujn jam mi ne konas. Krome, poste vi povos komplete disŝiri la paperon”. Libera kaj danka, li ekis la skribadon. La menciitan viron mi invitis eniri en la ĉambron kaj partopreni la sesion. Dankeme, li sindirektis al libera sidloko, prenis skribilon, paperon, trankvilon. Kurioze, kiam komenciĝis la legad-rondo li levis la manon kaj emocio eklegis sian verkon. Post la laŭdo de kolegoj, li sin konfesis surprizita, ĉar unuafoje venis al li poemo! Inĝeniero, tre racia, sed eble pro la enhavo veninta dum la 10-minuta teksto, li asertis aliri memorajojn kaj neatendite sukcesis verki tiele. Spontaneaj aplaŭdoj aŭdiĝis.

Aliokaze, en klaso de instruistoj pri la portugala, unu el ili asertis, ke li preskaŭ ne kredis pri la beleco de teksto de ne tiom brila lernanto. Tiu instruisto legis lian leteron omaĝe al la patro, kiu, enhospitaliĝinta, ne povis paŝi hejmen la kristnaskan feston. En tiu tago, kaŝe, kelkaj kolegoj tute vane penis ne ploreti.

Krom proponi plifojn tiun instigan kurson, venis al mi en la kapon la ideo esperantigi ĝin por instruado kadre de E-klasoj. Se partnero sin proponos, tio certe eblos. Dubon tamen mi havas, ĉu

tiu 10-minuta libera skribado ja funkcios aŭ ne fremdlingve. Supozeble por ne denaskuloj en Esperanto ĝi fiaskos, ĉar certe alia cerbo-areo stimuliĝos. Ĉu tio funkcios? Kion vi opinias pri tiu defio?

Certe plia klarigo povos veni el zorga esploro pri tiaj reagoj. Eble helpos nin

informiĝi pri la “kolektiva nekonscio” (Jung, 2017), pri vojoj de homa kreiveco (Goswami, 2008) kaj similaj. Ambaŭkaze, la suka verkaro naskiĝis el multaj jaroj de studoj kaj eksperimentoj. Minimume, jen bona irvojo por pliaj demandoj kaj esploroj. Ĉu vi tiucele sinprezentas, kara leganto?

## Referencoj

- ANDERSON, L. Rete, nur disponeblas tiu resuma mencio al la originala artikolo: <https://vidaplenaebemestar.com.br/inspiracao/sua-essencia/descobrimdo-ou-ritmo-pessoal>
- CLAVER, R. *Escrever sem doar: oficina de redação*. 2 ed. revista e ampliada. Belo Horizonte: Editora UFMG, 2006.
- GOSWAMI, A. *Criatividade quântica: como despertar o nosso potencial criativo*. Trad. Cássia Nasser, Marcelo Borges. São Paulo: Aleph, 2008.
- JUNG, C. G. *O eu e o inconsciente*. Trad. Dora F. da Silva. 27 ed. Petrópolis: Vozes, 2017.



# Progresoj kaj defioj en uzado de poŝtelefonoj en brazilaj lernejoj: Integra perspektivo

Ĉi tiu artikolo intencas analizi la integriĝon de teknologioj en edukado, ĉar ĝi estas revenanta temo en diskutoj pri nuntempaj pedagogiaj praktikoj. Marco Lucchesi, fama verkinto kaj edukisto, kaj Maryanne Wolf, en ilia teksto "La Neŭronoj de Legado", traktas la gravecon de legado kaj teknologio en la eduka procezo. Brazila leĝaro, same kiel gvidlinioj de internaciaj organizaĵoj kiel la OMS kaj Unesko, ankaŭ alportas gravajn pripensojn pri la uzo de poŝtelefonoj en lernejoj, elstarigante kaj la progresojn kaj defiojn de tiu praktiko.

Koncerne la rolon de legado kaj teknologio en edukado, Marco Lucchesi argumentas ke legado estas esenca kolono por la integra formado de individuoj. Li emfazas, ke la ago de legado aktivigas plurajn areojn de la cerbo, antaŭenigante neŭralajn ligojn, kiuj faciligas komprenon, empaton

kaj kritikan pensadon. En ĉi tiu kunteksto, Maryanne Wolf aldonas diskutante ke legado iras preter la mekanika ago; ĝi estas sperto kiu implikas interpreton kaj konstruadon de signifo. Ambaŭ aŭtoroj rekonas ke, en mondo regata de teknologio, la legado devas esti kuraĝigita, sed adaptita al novaj realaĵoj.

Teknologio, precipe poŝtelefonoj, fariĝis konstanta ĉeesto en la vivo de studentoj. Lucchesi sugestas ke, se uzataj konscie, poŝtelefonoj povas esti valoraj iloj por riĉigi lernadon, provizante aliron al diversaj informoj kaj rimedoj. Tamen, estas esence, ke lernejoj disvolvu pedagogiajn praktikojn, kiuj integrigas ĉi tiujn aparatojn efike, evitante distraĵojn kaj antaŭenigante respondecan uzon.

En Brazilo, eduka leĝaro, kvankam ĝi ne enhavas eksplacitan malpermeson pri uzado de poŝtelefonoj, per-

mesas al ĉiu institucio difini siajn proprajn regulojn. La Statuto pri Infano kaj Adolekanto (ECA) kaj la Gvidlinioj kaj Bazoj pri Nacia Edukado (LDB) emfazas la gravecon de lerneja medio, kiu favoras lernadon, sed lernejoj havas aŭtonomion por reguligi la uzon de teknologioj. Multaj institucioj adoptas politikojn kiuj serĉas ekvilibri la uzon de poŝtelefonoj kiel edukaj iloj kaj la bezonon konservi studentan koncentriĝon.

La Monda Organizo pri Sano (OMS) kaj Unesko ankaŭ traktas la temon de uzado de teknologio en edukado. La OMS emfazas la gravecon de la mensa kaj emocia bonfarto de junuloj, avertante pri la riskoj de troa uzo de ciferecaj aparatoj, kiuj povas influi atenton kaj mensan sanon. Aliflanke, Unesko defendas la integriĝon de teknologioj en edukado kiel rimedon por antaŭe-

nigi inkluzivon kaj egalecon en lernado, precipe en kunteksto kie aliro al informoj estas kerna.

Ĉi tiuj gvidlinioj emfazas la bezonon de ekvilibro. Dum teknologiaj aparatoj povas riĉigi lernadon, ili ankaŭ povas esti problemo. tial, edukistoj devas esti pretaj. Kvalifikitaj instruistoj fariĝas prioritato, permesante al ili gvidi studentojn en la konscia uzo de poŝtelefonoj, transformante eblajn distraĵojn en lernŝancojn.

La rilato inter la uzo de poŝtelefonoj en lernejoj kaj la defioj kaj progresoj de ĉi tiu praktiko estas kompleksa. Marco Lucchesi kaj Mariane Golf ofertas riĉigan perspektivon pri la graveco de legado kaj teknologio en la eduka procezo, dum brazila leĝaro kaj gvidlinioj de OMS kaj Unesko dispon-



igas kuntekston kiu emfazas la bezonon de reguligo kaj adaptado. La defio kuŝas en trovi manierojn integri poŝtelefonojn en edukadon en manieroj kiuj plibonigas lernadon, respektante la bezonojn kaj bonfarton de studentoj. Ĉi tio estas tasko, kiu postulas kunlaboron inter edukistoj, administrantoj kaj la lerneja komunumo, celante pli riĉan kaj inkluzivan lernomedion.

pisa-programa-internacional-de-avaliacao-de-vamos. Alirita la 24-an de oktobro. 2024.

LUCCHESI, M. A. . 1-a Renkontiĝo de la Brazila Akademio de Leteroj kun la Akademioj de Latin-Ameriko: la misio de la akademioj en la hodiaŭa mondo. 2020.

<https://www.canalsaude.fiocruz.br/noticias/noticiaAberta/unesco-recomenda-proibicao-global-de-smartphones-nas-escolas27072023> Alirita je: 24 okt. 2024.

[https://www.al.sp.gov.br/spl/2024/04/Propositura/1000549285\\_1000689688\\_Propositura.pdf](https://www.al.sp.gov.br/spl/2024/04/Propositura/1000549285_1000689688_Propositura.pdf) Alirita la 24an de oktobro. 2024.

## Bibliografiaj Referencoj

STANISLAS DEHAENE. 2012. Legado de neŭronoj: kiel la scienco klarigas nian kapablon legi, Porto Alegre, Penso.

Chartier, Roger. [1977] 1998. La aventuro de la libro: de leganto ĝis navigisto. Traduko de Reginaldo Carmello Corrêa de Moraes, São Paulo, Oficiala Gazetaro de la Ŝtato São Paulo kaj Eldonisto de Unesp.

Funkcia Legopovo Indikilo. Instituto Paulo Montenegro. Havebla ĉe: [http://www.ipm.org.br/ipmb\\_pagina.phpmpg=4.02.00.00.00&ver=por](http://www.ipm.org.br/ipmb_pagina.phpmpg=4.02.00.00.00&ver=por). Alirita la 24-an de oktobro. 2024.

Nacia Instituto de Edukaj Studoj kaj Esplorado Anísio Teixeira. 2009. Eroj publikigitaj Pizo 2009. Havebla ĉe: <http://portal.inep.gov.br/internacional-novo-pisa-itens>. Alirita la 24-an de oktobro. 2024. \_\_\_\_\_.

PISA. Havebla ĉe: <http://portal.inep.gov.br/>

## Patricia Guerra Radsack

PhD-studento ĉe Salgado de Oliveira University – Niterói-RJ Campus. Havas magistron de Universidade Salgado de Oliveira – Campus Niterói-RJ.



Estas diplomita pri Historio ĉe la Universitato Salgado de Oliveira en São Gonçalo – RJ. Ŝi havas kvalifikaĵojn en Geografio, Sociologio kaj Filozofio. Disvolvas esploradon en la areo de krimo en la regiono Santa Luzia do Carangola fine de la 19-a jarcento.



# Lingvaj Respondoj

## de Francisco Wechsler



### Demando

Prepozicioj estas vortetoj foje kun subtilaj nuancoj. Inter de kaj *pro*, ekzemple, kiun prepozicion elekti en la jenaj frazoj? *Jozefo mortis de/pro kancero. Ŝi ruĝiĝis de/pro honto. Mi suferas de/pro migreno.*

### Respondo

ume: ĉiam eblas uzi la prepo-zicion *pro*, sed ne ĉiam eblas uzi la prepo-zicion *de*.

Pli detale: la prepozicion *pro* oni ĉiam povas uzi, ĉu temas pri kaŭzo, ĉu pri motivo. Do estas sendube ĝustaj la frazoj: *Jozefo mortis **pro** kancero; Ŝi ruĝiĝis **pro** honto; Mi suferas **pro** migreno.* Aliflanke, la prepozicion *de* oni povas ankaŭ uzi rilate kaŭzon, sed ne rilate motivon. Sekve ankaŭ *de* estas aplikebla en la tri frazoj, ĉar kancero, honto kaj migreno povas esti rigardataj kiel kaŭzo, rezulte: *Jozefo mortis **de** kancero; Ŝi ruĝiĝis **de** honto; Mi suferas **de** migreno.*

lafoje, temas klare pri motivo, ne kaŭzo, do tiam — kaj nur tiam — ne eblas uzi la prepozicion *de*. Jen ekzemploj ĉerpitaj el la *Fundamenta Ekzercaro*, en kiuj eblas uzi nur *pro*, sed ne *de*:

*Morti **pro** la patrujo estas agrable* (§20). Kontraste, *morti **de** la patrujo* estas sensenca esprimo. Supozeble Zamenhof elektis tiun ĉi ekzemplon ĝuste por montri la rolon de *pro* en esprimo de motivo.

[...] *li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj **pro** kio ŝi ploras* (§21). Neeblas uzi la prepozicion *de*, ĉar temas pri motivo.

Mi ridas **je** lia naiveco (aŭ mi ridas **pro** lia naiveco, aŭ: mi ridas **lian** naivecon) [...] (§29). Rimarku, ke Zamenhof ne montris alternativon kun *de*, ĉar la frazo fariĝus sensenca.

Li amas tiun ĉi knabinon **pro** ŝia beleco kaj boneco (§35). Ankaŭ tie ĉi neeblus uzi **de**.

Aliflanke, jen ekzemploj el la *Ekzercaro*, en kiuj Zamenhof uzis la prepozicion *de* por esprimi kaŭzon. Rimarku, ke kompreneble oni ankaŭ povus uzi *pro*:

*Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari* (§38).

*Li paliĝis de timo kaj poste li ruĝiĝis de honto* (§39).

Mi eksaltis **de** surprizo (§40).

Jen tri pliaj Zamenhof-aj ekzemploj pri tia uzado de la prepozicio *de*:

*La malfeliĉa birdo certe mortis de malvarmo* (Fabeloj de Andersen v.1).

*Ŝiajn malgrandajn piedetojn ŝi subtiris sub sin, ŝi tamen ankoraŭ pli suferis de la frosto* [...] (Fabeloj de Andersen v.2).

*Ĉiuj ĝojkriis de ravo* [...] (Fabeloj de Andersen v.3).

La malfacilaĵo konsistas en tio, ke ne ĉiam oni sukcesas aŭ intencas distingi, ĉu temas pri kaŭzo aŭ pri motivo. Tiam la elturniĝo estas uzi *pro*.



58° CONGRESSO BRASILEIRO DE  
**ESPERANTO**  
14 A 17 DE NOVEMBRO DE 2024 • SALVADOR, BAHIA



Por pliaj informoj iru al: <https://esperanto.org.br/kongreso>

# Oni privatigu ĉion!

José Saramago (tradukis: James Piton)

el “Kajeroj de Lanzarote – Taglibro III”, 1996.

*La Kajeroj de Lanzarote estas kolekto de la taglibroj de José Saramago verkitaj en la periodo de 1993 ĝis 1995 en la hispana insulo Lanzarote, en la Kanaria insularo, kie li vivis kun sia edzino Pilar.*

*Sub noto pri la privatigo de gravaj turismaj areoj en Peruo, Saramago skribis la 1-an de Septembro 1995:*

Al mi ŝajnas bone.

Oni privatigu Maĉu Pikĉu,

oni privatigu Ĉan Ĉan <sup>(1)</sup>,

oni privatigu la Sikstan Kapelon,

oni privatigu Partenonon,

oni privatigu Nuno Gonçalves <sup>(2)</sup>,

oni privatigu la Katedralon de Chartres,

oni privatigu la Mallevon de la Kruco <sup>(3)</sup>,  
de Antonio da Crestalcore,

oni privatigu la Portikon de Glória <sup>(4)</sup>  
de Santiago de Compostela,

oni privatigu la Andojn,

oni ĉion privatigu, oni privatigu la maron kaj la ĉielon,

oni privatigu la akvon kaj la aeron,

oni privatigu la justicon kaj la leĝon,

oni privatigu la pasantan nubon,

oni privatigu la sonĝon, ĉefe se ĝi estos dumtaga kaj kun malfermitaj okuloj.

Kaj fine, por la gloro kaj kulmino de tiom da privatigoj,

oni privatigu la Ŝtatojn, oni definitive liveru ilian ekspluatadon al privataj

entreprenoj post internacia konkurso.  
En tio troviĝas la elsavo de la mondo...

Kaj cetere, oni privatigu ankaŭ  
la p\*\*\*\*\*, kiu naskis ilin ĉiujn.



José Saramago (1922 - 2010)

(SARAMAGO, José. Cadernos de Lanzarote. São Paulo: Companhia das Letras, 1997, p. 586 – la vorton ni prude kaŝis, la aŭtoro eksplacitis)

### **Notoj:**

- (1) – Ĉan ĉan ("suno suno"), regno kaj urbo de la imperio de ĉimuj proksime de Trujillo, en la nordo de Peruo. La urbo estis farita el koto kaj loĝejo por ĝis 50 mil homoj, ĝis antaŭ 600 jaroj.
- (2) – Nuno Gonçalves, portugala pentristo (1420-1470)
- (3) – Mallevo de la Kruco estas katolika ceremonio post la meso de Pasiona Vendredo kaj antaŭ la procesio de la Mortinta Sinjoro.
- (4) – Portiko de Gloria estas ŝtonportalo farita inter 1168 kaj 1188 en la Katedralo de Santiago de Compostela, Hispanio.



## **La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK)**

okazos de la 28-a de novembro ĝis la 1-a de  
decembro 2024! Jam eblas aliĝi al ĝi:

**<https://vk.esperanto.net/2024>**

# Hispana Somero

Paulo Sergio Viana

“Hispana Somero”

Aŭtoro: Nordhal Grieg

(El la volumo “Volontuloj kun okulvitroj”, eldonita de SAT en Hispanio, 2024. Kunordigis kaj kompletigis Toño del Barrio.)

La hispana enlanda milito en la komenco de la 20-a jarcento signifis ion tre fortan por la tuta okcidenta mondo, eble por la tuta mondo. Konfrontiĝis la respublikanoj, kiuj estis alprenintaj la povon en tiu lando, post la kadukiĝo de monarĥio, kontraŭ faŝistaj konvativaj potencoj, kiuj estis alnomataj “falangistoj”. Do, maldekstruloj el diversaj frakcioj kontraŭ dekstruloj apogataj de la militistaj fortoj. Nuntempe, kiam la 21-a jarcento jam rapide fluadas, ĉi tiu klara divido aspektas al plej multaj homoj iom artefarita, iom skemeca kaj tro malpreciza. Nuntempe, dekstro kaj



maldekstro en politiko jam ne montras klaran konturon.

Sed okaze de la hispana milito, maldekstruloj el aliaj eŭropaj landoj, kaj eĉ el Ameriko, sentis sin motivitaj defendi siajn hispanajn fratojn. Multaj venis por batali solidare. Inter tiuj, multaj intelektuloj, kiuj konsideris sin morale devigitaj al tiu apogo. Jen la kialo de la titolo de ĉi tiu bela volumo



eldonita de SAT-Hispanio: “Volontuloj kun okulvitroj”. Kurioza ligo de okulvitroj al intelekta vivo...

La dua libro en tiu volumo, nome “Hispana Somero”, estis verkita de norvega ĵurnalisto, Nordhal Grieg. Ĝi konsistas el sinsekvo da nelongaj tekstoj, kiuj priskribas scenojn de la milito. Jen teruraj priskriboj de vunditoj, de la vivo en tranĉeojn, jen alfrontado de bomboj kaj kanonaj pafoj, jen mizero pro malsanoj, malsato kaj soifo.

Ofte hantas la superflugado de ĉasaviadiloj super la kapoj de la soldatoj. Troviĝas ankaŭ la priskribado de la popolaj reagoj al la longa suferado, ekzemple okaze de la sieĝo de Madrido, kie heroe rezistis la popolo mem. Kompreneble, la respublikanoj estas ĉiam montrataj kiel humanistoj,

demokratoj, idealistoj, justuloj kaj fideluloj al la idealo de demokratio... La partopreno de tre junaj soldatoj, fakte preskaŭ infanoj, estas aparte kortuŝa, kruela flanko de la terura milito.

En la fino de la libro, oni publikigis paroladon de la aŭtoro okaze de kongreso de verkistoj, en kiu li pledas por la morala devo de intelektuloj al batalado por pli justa socio.

La verko estas interesa, ĉar ĝi klare montras la sintenon de unu el la flankoj en la hispana interna milito. Kompletigas ĝin tekstoj pri la tiamaj historiaj faktoj, pri la partopreno de intelektuloj, pri la rolo de Esperanto en tiu konflikto. Fine, oni povas legi biografiojn de la aŭtoroj de la du verkoj, kiuj konsistigas la interesan volumon “Volontuloj kun okulvitroj”.



## SCIIGO al la anoj de EASP

La venontan februaron la anaro kunvenos por elekti novan estraron de EASP. La nomaron oni sendu plej malfrue ĝis la 15-a de januaro 2025 al <contato@easp.org.br>.

**Pliaj informoj** <https://easp.org.br/asocio/estatuto>

## E-kongreso en Paulínia: Plena sukceso!

Je la 14-a kaj 15-a de septembro 2024, okazis en la bela urbo Paulínia la 16-a Kongreso de Esperanto en la Ŝtato San-Paŭlo. Tiu evento, sub la organizado de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, okazas unufoje en ĉiu jaro, kaj reprezentas la plej gravan kulturan manifestacion en tiu brazila ŝtato, koncerne la movadon por diskonigado kaj praktikado de la Internacia Lingvo.

Ĉeestis la vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Fernando Maia Jr.. Partoprenis pli ol sepdek parolantoj de Esperanto, venintaj el sep brazilaj ŝtatoj. Ĉi tiu estis la lingvo uzata en la prelegoj, diskutoj, kursoj kaj koridoraj babiladoj. Tamen, unu el la ĉambroj en la kongreso estis rezervita por neesperantista publiko, kiu ĉeestis, interesita pri informoj pri tiu kulturmovado jam dissemita en ĉiuj kontinentoj.

Dum la malferma ceremonio, estis omaĝitaj pluraj ĵus mortintaj Esperantistoj, kiuj multe kontribuis al la movado en Brazilo.

Jenaj prelegoj estis prezentitaj en la programo de la kongreso:

*“Esperanto – la ardanta bonflamo”* (Saulo Wanderley, Rio de Janeiro-RJ); *“Esperanto, ebla komuna lingvo de BRICS-landoj”* (Emílio Cid, São Vicente-SP); *“Ĉu sonĝo aŭ realaĵo?”* (Elmir dos Santos, Rio de Janeiro-RJ); *“Esperanto en la Bienalo Rio 2025”* (Álvaro Motta, Rio de Janeiro-RJ); *“La nuntempa laboro de Esperanto-Ambasadejo”* (Fábio Silva, Pouso Alegre-MG); *“La sep gravegaj pekoj nove vestitaj”* (José Progiante, Bauru-SP); *“Emocioj, memoroj, subjektiveco”* (Rodrigo Mendonça, Araraquara-SP); *“Ĉarlatanaĵoj en jutubo”* (Francisco Wechsler, Campinas-SP); *“Couto Fernandes, plurjardeka prezidanto”* (James Piton, Paulínia-SP); *“Esperantigo de verkoj de Monteiro Lobato”* (Jorge Teles, Campo Largo-PR); *“Programo Mia Amiko”*- (Adonis Saliba, Vila Velha-ES); *“Kreema, noviga metodo”* (Ismael Ávila, Campinas-SP); *“Fulma kurso de Esperanto”* (Cristina Graaf, Ilhabela-SP);

“Kolektiva intervjuo” (Tatiana Leskova, Ivanovo-Rusujo); “*Esperanto estas vivanta lingvo*” (Emerson Werneck, Brasília-DF); “*Aktivaĵo: vorto-ŝanĝo*” (Rodrigo Mendonça, Araraquara-SP); “*Paroliga aktivaĵo*” (Wilian Gomes, Ilhabela-SP); “*Esperanto en Rotario*” (João Veiga, Poços de Caldas-MG); “*Interago: kio vi estas? kiu vi estas?*” (Rodrigo Mendonça, Araraquara-SP).

Dum la kongreso, funkciis libro-servo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, kun lanĉo de tri novaj titoloj en Esperanto: “Tri noveloj de Graciliano Ramos”, “Katarina, la eta” (infanlibro)

kaj “Kurba” (kolekto de noveloj originale verkitaĵoj en Esperanto).

Oni ankaŭ montris standon de esperanta asocio pri ekoludilejo”, sub la respon-deco de Tereza Nunes, kunordigando, kaj Cacilda Cabral, Elisabel Chele, Maria Gomes, Maria I. de Paula, Wildes Assis.

Fine de la 16-a Kongreso Esperanto de Ŝtato San-Paŭlo, la ĉeestantoj esprimis sian dankon per varma, longa aplaŭdo al la loka aktivulo James Resende Piton, ĉefa motoro en la loka organizado de la evento — granda sukceso!



*Kelkaj partoprenantoj amasiĝas antaŭ la kongresejo por komuna fotado*

# Esperanta Ambassadejo de Poŭzalegro: Movado por inkluzivo kaj kulturo

Fondita en 2013 kiel sendependa kaj neprofitcela institucio, Esperanta Ambassadejo de Poŭzalegro havas kiel sian ĉefan mision la promocion kaj diskonigon de Esperanto, la internacia lingvo planita por faciligi komunikadon kaj antaŭenigi pacon inter popoloj. Nia laboro fokusiĝas en la sudo de la subŝtato Minaso, kaj nia intenco estas transformi Poŭzalegron en la "Brazila Urbo de Esperanto".

## **Projektoj kaj Iniciatoj: Dulingvaj Informŝildoj en Publikaj Lokoj**

Unu el la plej gravaj projektoj de Ambassadejo estas la dulingvaj informŝildoj (Portugala-Esperanta) en diversaj publikaj lokoj de la urbo. Lastatempe estis instalitaj informŝildoj ĉe la busstacidomo kaj flughaveno de Poŭzalegro, faciligante la vivon de esperantistoj, kiuj vizitas la urbon, kaj plialtigante la konscion pri la lingvo inter lokaj loĝantoj. Krome, la Urba Teatro, unu el la ĉefaj kulturaj spacoj de la urbo, ankaŭ ricevis nian dulingvan surskribon, emfazante la gravecon de

Esperanto en kulturaj kaj edukaj eventoj.

La ekspansio de la informŝildoj atingis ankaŭ gravajn kulturajn centrojn, kiel la Kulturcentro Cleonice Bonillo Fernandes kaj la Kulturdomo Menotti del Picchia, reafirmante la devontigon de Ambassadejo al inkluzivo kaj lingva diverseco. Tiuj spacoj estas renkontpunktoj por artistoj, edukistoj kaj la ĝenerala publiko, kaj la ĉeesto de Esperanto en tiuj lokoj estas invito por ke ĉiuj ekkonu kaj familiariĝu kun la lingvo.

Krome, unu el la ĉefaj sportaj centroj en la urbo, la Civitana Stacio, ĵus ricevis informŝildojn en la portugala kaj esperanto. Aliaj projektoj inkluzivas ankaŭ la instaladon de dulingvaj informŝildoj ĉe la stratoj de La kvartaloj Colina Verde kaj Cohab.

## **La Estonteco de Esperanto en Poŭzalegro**

Nia celo estas daŭre ekspansii tiun iniciaton al aliaj lokoj de la urbo kaj

tiel konfirmi Poŭzalegron kiel esperantistan kulturpolon en Brazilo. Ne plu estas nebla revo vidi la internacian lingvon uzata ĉiutage en nia urbo, antaŭenigante kulturajn interŝanĝojn kaj altirante vizitantojn el ĉiuj partoj de la mondo. Ni estas malfermitaj al partnerecoj kaj novaj ideoj, kiuj povos fortigi tiun movadon, kaj invitas ĉiujn ekkoni pli pri nia laboro.

En nia urbo, eblas vidi Esperanton surstrate, ĉar ni kredas ke la lingvo internacia bezonas esti parto de la ĉiutaga vivo de la homoj. Ni el Esperanta Ambassadejo, kredas ke la lingvo estas potenca ilo de unueco. Per Esperanto, ni volas montri, ke komunikado ne bezonas barilojn kaj ke, kune, ni povas konstrui pli solidaran kaj inkluzivan mondon.

Se vi, iam, vizitos Poŭzalegron, vi estas tre bonvena viziti nian institucion; Esperanta Ambassadejo estas loko malfermita al esperantistoj el la tuta mondo.

Pliaj kaj detalaj informoj pri niaj projektoj vi trovos ĉe:

[linguainternacional.org/projektoj](http://linguainternacional.org/projektoj)

### Fabjo Silva

Fondinto kaj Direktoro de Esperanta Ambassadejo



Sube: ambasadeja lernoĉambo;  
supre dekstre: Fabjo Silva,  
fondinto de Esperanta Ambassadejo.

## Malpleno

Augusto Frederico Schmidt

Poezio forkuris el la mondo.  
Amo forkuris el la mondo —  
Restas nur domoj,  
Tramoj, aŭtomobiloj, homoj,  
Telegrafdratoj etenditaj,  
Sub la ĉielo lumaj reklamoj.

Poezio forkuris el la mondo.  
Amo forkuris el la mondo —  
Restas nur homoj,  
Etaĵ, urĝemaj, egoismaj kaj senutilaj.  
Restas la vivo, kiun oni devas vivi.  
Restas volupto, kiun oni devas estingi.  
Restas la bezono de poezio, kiun oni devas kontentigi.



Augusto Frederico Schmidt  
(1906 - 1965)

*(Esperantigis P.S.V.)*

## La Kristo Redemptora en verda koloro je la 15-a de decembro

La statuo de la Kristo Redemptora estas unu el la mirindaĵoj en la Moderna Mondo. La urbo Rio-de-Ĵanejro, kies pejzaĝo enkadrigas tiun monumenton, reprezentas krome la brazilan bildon plej konatan eksterlande. Je la plej proksima 15-a de decembro, unu plia internacia elemento kunformas tiun bildon. Je tiu tago, la lumsistemo de la monumento verdigos la Kriston, pro la Tago de Esperanto.

Festado en tiu dato jam estas parto de la oficiala kalendaro en multaj brazilaj urboj kaj ŝtatoj, inkluzive de Rio mem. La verda koloro aperas sur la flago, kiu reprezentas la movadon de tiuj, kiuj defendas ampleksan uzadon de la internacia lingvo Esperanto kiel dua lingvo. Nome, lingvo neŭtrala, kiu faciligas la interŝanĝojn kaj internaciajn rilatojn inter civitanoj el malsamaj kulturoj, sen privilegioj al la denaskaj parolantoj de unu aŭ alia nacia lingvo.

Pro apogo de la kardinalo-arkiepiskopo de Rio, Dom Orani Tempesta, tiu

evento ricevas la entuziasman apogon de la rektoro de la Sanktejo de la Kristo Redemptora, Pastro Omar Raposo. Koncerne lingvon kreitan pro la idealo de kunfratiĝo inter ĉiuj popoloj, la iniciato de la Arkidiecezo estas tute kongrua. La plej antikva asocio de parolantoj de Esperanto estas precize internacia laika organizo de katolikoj-Esperantistoj, I.K.U.E., fondita en la jaro 1910. Radio Vatikana proponas tri semajnajn programojn en tiu lingvo (<https://www.vaticannews.va/eo>), kaj Papo Johano Paŭlo la II-a, poligloto, aldonis Esperanton al pli ol 50 lingvoj, en kiuj li donis, okaze de Kristnasko kaj Pasko, en la Baziliko Sankta Petro, la benojn Urbi et Orbi (universalajn).

La peton al la Arkidiecezo faris Walter Fontes, aktivisto por Esperanto en la urbo Niterói, en la ŝtato Rio-de-Ĵanejro. La 15-a de decembro aludas al la dato, kiam naskiĝis, en 1859, en Pollando, la iniciatinto de la lingvo, oftalmologo Lazaro Zamenhof.

**James R. Piton**

# Quer aprender Esperanto?

**PROGRAMO  
MIA AMIKO**



**[pma.esperanto.org.br](http://pma.esperanto.org.br)**